


# „Esperanto ligas homojn”

Mi estas civitano de la mondo – la 9a eldono de la literatura konkurso



La fiera titolo de la literatura konkurso organizita en la jaro 2019 fare de Podlańska Libraro Łukasz Górnicki kaj Bjalistoka Esperanto-Societo celis montri tion, kion atingis esperantistoj ripe tante post Zamenhof, ke ĉiuj homoj estas fratoj kaj la mondo pliboniĝos kiam ni tion ekkomprenos. Ĉu la universala lingvo helpis al ili dum la realigado de vivaj fascinoj? Eble ĝi estis pli utila sur la etapo de rakonto pri tiuj fascinoj kaj dum la transdonado de bonaj ekzemploj al la aliaj?

„Mondaj civitanoj rigardas la tutan teron kiel sian domon kaj komprenas, ke sidi en unu ĉambro de tiel grandega bieno estas sence. Ili kredas ne je landlimoj, sed je homoj. Pro tio veraj mond-civitanoj ne dividas la problemojn de la homaro je „niaj” kaj „iliaj”: ili pripensas la destinojn de la tuta planedo – diris Viktoro – la heroo de unu el la verkoj.

La konkurson partoprenis 15 verkoj el Pollando, Ĉeĥio, Francio, Finnlando kaj Rusio. Ni alku-timiĝis legi pri vojaĝoj kaj renkontiĝoj kun aliaj esperantistoj ie en la mondo, pri partopreno en kongresoj, rakontojn pri bonvolemaj homoj servantaj kadre de Pasporta Servo, sed ĉifoje la aŭtoroj traktis tutmondajn problemojn.

La unuan premion ricevis la verko pri servoj de „Kuracisto sen limoj”. Entuziasmoj, kiuj legadis kaj spektadis pri homa mal-feliĉo ofte alprenas frenezajn decidojn forvojaĝi „ien malproksimen” por savi aliulojn.

Malfavora situacio surloke, sopiro je proksimumoj, relative malgrandaj rezultoj, reala danĝero se temas pri vivkondiĉoj kaŭzas daŭran streĉon. Tiu ĉi streĉo ĉas-kaptas ilin, sed ankaŭ restantajn enlande iliajn proksimumojn. Ĝuste pri tio rakontis Joanna.

Dum unu el la Universalaj Kongresoj, kadre de la Somera Universitato ni partoprenis prelegon de Jose Antonio Vergara – kuracisto el Ĉilio – pri la sorto de afrikaj infanoj – orfoj, kiujn la gepatroj infektitis per la viruso HIV. La informojn kolektis kaj poste rakontis pri tio Cecylia – la aŭtorino de la sekva premiita verko.

„Ne estas tero, ne estas limoj, ne estas pasportoj... Estas nur homoj. Ĉiuj ĝiaj loĝantoj estas ambasadoroj de ĉi tiu unusola lando. Nek estas estroj, nek civitanoj, neniuj aliaj rajtoj krom... la kosmaj leĝoj – tiajn viziojn de Mondaj Civitanoj prezentis en sia laboro la nova aŭtorino.

Eble oni devas konsenti, ke „... la plej grava eco de la Monda civitano estas scivolemo? Se ni posedas ĝin, ĉio alia evidentiĝas banale facila – opiniis alia verkanto.

„Kiam mi lernis Esperanton, mi iom post iom transpaŝis landlimojn, kiujn homoj desegnis per sango, politiko kaj traktatoj. Antaŭ mi malfermiĝis la mondo sen limoj” – pravigis sian teorion ankoraŭ alia partoprenanto de la konkurso.

E. Karczewska

**Ni gratulas al ĉiuj aŭtoroj de la alsenditaj konkursaj verkoj, kaj precipe ni gratulas al tiuj, kiuj ricevis la 3 unuajn premiojn:**

*Joanna Sokalska el Varsovio pro la verko „Kurcistoj sen limoj”*

*Cecylia Hlebowicz el Bjalistoko pro la verko „Anna en Afriko”*

*Viktor Lagutin el Ĥabarovsko pro la verko „Bjalistoka fantazio”*



## Iam estis la trajno...

La 1-an de junio 2008 tuj antaŭ la 6-a horo oni ŝanĝis la tabulojn sur trajno iranta de Bjalistoko al Bielsko-Biała. „Narew” ŝanĝiĝis en „Zamenhof”. Ne ŝanĝiĝis la itinero. Dum la veturo oni disdonis flugfoliojn pri Esperanto kaj Bjalistoko al la pasaĝeroj. Ĉio ĉi estis por diskonigi la 94-an Universalan Kongreson, kiu estis okazanta en tiu urbo en 2009. Ĉe la trajnstacio en Bjalistoko okazis solena ŝanĝo de la tabuloj kun la trajnonomo. Krom la pasaĝeroj, al la stacidomo venis: la urbestro de Bjalistoko Tadeusz Truskolaski, esperantistoj, sed ankaŭ la plej gravaj gastoj: Ludoviko kaj Klara Zamenhof, kies rolojn ludis bjalistokaj esperantistoj. La estimata paro ekveturis per la trajno. En Varsovio kaj Bielsko-Biała atendis ilin esperantistoj. Ĉiufoje ili estis salutataj per kriaĵ „Saluton! Saluton!”.

### „Zamenhof” ne plu funkcias

Hodiaŭ ne plu ekzistas en Pollando trajno kun la nomo „Zamenhof”. Ni turnis nin al PKP Intercity S.A. kun la demando kio okazis kun la trajno „Zamenhof”. Jen oficiala respondo, kiun ni ricevis antaŭ ne-longe: „Mi afable informas, ke la trajno „Zamenhof” iranta inter Bjalistoko kaj Bielsko-Biała Główna, ekde la ŝanĝo de la trajnhoraro en decembro 2018 ekhavis pli mallongan itinero, Varsovio la Orienta – Bielsko-Biała la Ĉefa. Ĉar la familia nomo „Zamenhof” estas sendube asociata kun Bjalistoko, ne estis racie konservi la nomon por la mallongigita itinero de la trajno. Kiam oni planos sekvajn jarajn trajnhorarojn, oni prikonsideros la eblon doni la nomon „Zamenhof” al unu el la trajnoj veturantaj el Bjalistoko. Kun estimo, Paweł Lejkowski – konsultanto de informo telefoninio de PKP Intercity”.

(sed)

## Esperanto-cigaredo

Esperantaj nomoj ricevis, kaj ofte plu ricevas, diversaj objektoj kaj aĵoj en la mondo. Kaj tio okazas ne nur, kiam ili havas rektan rilaton al Esperanto. Kutime estas tiel, ke la posedanto, produktanto aŭ aŭtoro havis kontakton kun la internacia lingvo Esperanto aŭ mem estas esperantisto. Ni jam raportis pri Esperantaj parfumo kaj ŝipo, hodiaŭ ni mencias pri la cigaredoj Esperanto. Ili estis vendataj verŝajne en la jaroj 1933–1935. Almenaŭ tiel oni konkludas leginte La Britan Esperantiston, n-ron 358 el 1935. En tiu, en pli fruaj kaj sekvaj numeroj de la gazeto aperis reklamoj de la cigaredoj Esperanto. Tie oni certigis, ke temas pri altkvalitaj, man-

faritaj cigaredoj el la pura tabako Virginia. Unu pakajo kostis 20 (red. pundojn) kaj por 10 paketoj oni devis pagi 14. Jam en tiu tempo ekzistis kaj sufiĉe bone funkciis perpoŝta vendado. La produktanto de la cigaredoj Esperanto estis la iam konata kaj ĝis nun funkcia firmao Buchanan Scott & Co Glasgow.

(Surbaze de La Brita Esperantisto n-rp 358, 1935)

